



HORIZONTO

Jurbarko esperantininkų informacinis leidinys

NUMERO 3(26) (III-A KVARONO) 2018

SALUTOJ, BONDEZIROJ

Intertempe 07.01-09.30 klubanoj festas naskiĝtagojn: **Estimataj Irena Viliušienė (07.07), Rimantas Endriulaitis (07.03), Antanas Gvildys (07.30)**



Ni gratulas vin kaj deziras al vi sanon, sukceson kaj ĝojon!
Geklubanoj de Esperanto klubo

INFORMOJ

La 24-an de aŭgusto okazis kunveno de klubanoj de Jurbarkas Esperanto klubo „Horizonto“. Partoprenis 8 anoj. Stanislovas Raulynaitis prezentis informilon pri la BET-55. Estis informita pri la estinta ekskurso al Plungė-Telšiai. Ankaŭ S. Raulynaitis rakontis pri siaj ekskursoj kun sia nepino Austina, kiu ferias en Litovio. Estis legitaj interesaj artikoloj el revuo La Ondo.

Irena Viliušienė

Esperantistoj el la klubo Horizonto komune vojaĝas

Dum III-a kvaronjaro ni partoprenis en la tri ekskursoj: al palaco Rundale – Jelgava, al distrikto Plungė – Telšiai kaj al Bialistoko. Pri la unuaj du ekskursoj kurte mi rakontos en tiu numero, pri la ekskurso al Balstoge rakontos en la sekva numero.

Ekskurse al Latvio al la palacoj de Rundale kaj Jelgava ni vojaĝis la 6-an de julio. Veninte al palaco Rundale ni

ekvidis eksterordinare belan ĵardenon – parkon. Konatiĝinte kun historio, trarigardinte ekspoziciojn de palaco ni iris al la tre bone prizorgita parko. Kiuj deziris-havis eblecon traveturi ĝin per kaleŝo, aŭ iri perpiede.



Palaco de Rundale



Momento el la ekskurso en la palaco



Momento el la ekskurso en la palaco



Momento el la ekskurso en la palaco



Juozas Minikevičius subskribas en la libro de vizitantoj, apud Sonata Paulienė



Rigardo al parko



Vojo al parko

Poste ni veturis al Jelgava, kie ni konatiĝis kun la kripto de dukoj. Aŭskultis interesajn rakontojn de nia konstanta ĉiĉeronino Aida.



En la kripto de dukoj

Poste ni perpiede iris al haveneto kaj navigis en la riveroj Lielupe kaj Driksa. Ankoraŭ ni suprengrimpis la turon de observo.



Nia ekskursanino Sonata „petas“ feliĉon



En la ŝipo

Informilon preparas redakcia komisiono.

Pro enhavo de artikoloj respondecas mem subskribintoj



Oni iras al la haveneto

Poste ni veturis al la bieno Blūdzi por gustumi fromaĝon. Kun propra fromaĝo nin konatigis mirinda dommastrino. Post la bonega gastumado ni aĉetis diversan sanan manĝaĵon kaj veturis hejmen. Je la 21-a horo ni estis iom malantaŭ urbo Šiauliai. Tie ni, kiel tuta Litovio kantis nacian glorkanton. Hejmon atingis ni kun bonega humoro.



Ni ĉe la domo en kiu gustumis fromaĝon



Ni kantas nacian glorkanton



Post la kantado de nacia glorkanto

Fotoj de E. Paula kaj V. Motiejūnas

La 15-an de aŭgusto ni ekskursis al la distrikto Plungė. Unua haltejo estis en la palaco de Oginskis en Plungė. Ni konatiĝis kun ekspozicioj de palaco, ekaŭdis interesan

historion. Poste kun ĉiĉeronino ni iris promenadi en la parko de palaco. En la parko nin ĝojigis belega naturo. Poste ni ekskursis en la regionan parkon de Plateliai. Apud lago Plateliai en la bela angulo de naturo en la loka kafejo „Burė“ni tagmanĝis kaj komencis turisman viziton en Plateliai. En la turisma centro de Plateliai konatiĝis ni kun ekspozicio „Trezoroj de tero Ĵemajtio“. Poste sekvis porrigarda placeto apud lago Plateliai. Tie estis videblaj belegaj vidaĵoj. Pos tio ni veturis al la parko de Plateliai, kie kreskas en Litovio plej dika frakseno. Kun granda ĝojo ni rigardis ekspozicion Karnavala Mardo, kiu estis aranĝita en la grenejo. Kaj lasta objekto, kiun ni vizitis en la Plateliai estis muzeo de malvarma milito. Ĉi tie ni kaptis eblecon ekkoni kian teruran „monstron“ ni havis en Litovio. Bone , ke ĝi ne estis uzita.

Poste ni veturis al Telŝiai, kie ni vizitis produktejon de fromaĝo „Džiugas“ kaj partoprenis en la gustumado de fromaĝo. Post gustumado ni aĉetis iom da fromaĝo kaj veturis hejmen.



Palaco de M. M. Oginskis en Plungė



Ekskursanoj pririgardas ekspozicion




Palaco de M. M. Oginskis en Plungė



Ekskursaninoj pririgardas ekspozicion



Ekskursanoj en la parko de Palaco de M. M. Oginskis en Plungė



Parko de Palaco de M. M. Oginskis en Plungė



Unu domo el ensemblo de Palaco de M. M. Oginskis en Plungė



La plej dika en Litovio frakseno



S. Raulynaitis en ekspozicio Karnavala Mardo



En la muzeo de malvarma milito



Unu konstruaĵo el ekspozicio de muzeo de malvarma milito



Telšiai, la domo de fromaĝo „Džiugas“. Gustumado.
Fotoj S. Raulynaitis

**Prezidanto de la Esperanto klubo Horizonto
Stanislovas Raulynaitis**

Impresoj pri vojaĝo al Turkio

Pasintjare, aŭtune mi kun mia nepino kaj kun ŝia filo (mia pranepo), ripozis en unu marbordregiona

Informilon preparas redakcia komisiono.

6

Pro enhavo de artikoloj respondecas mem subskribintoj

urbeto de Turkio, kiu nomiĝas Kushadasi. Kushadasi situas ĉe la Egea Maro.



Sur la foto la parteto de Kushadasi. Malproksime videblas insulo Samos, kiu apartenas al Grekio.



Hotelo AKBULUT, kie ni ripozis



Mi kun pranepo Jacob



Mi kun pranepo Jacob

Proksime al Kushadasi situas alia urbeto, sub nomo Selchuk. Ĉi tiu urbeto aspektas imprese, ĉar ĝi situas inter grandaj montoj. Unu monto el ili nomiĝas Najtingala Monto. Oni pensas, ke en ĉi tiu Najtingala Monto loĝis Maria Patrino de Jesuo. Ĉi tie ŝi posedis propran malgrandan dometon, kiun konstruis sankta Johano Evangelisto. Do, kiam estis krucumita Jesuo Kristo, li petis Johanon, ke tiu prizorgu lian patrinon post morto de Jesuo. Tio estas skribita en Biblio. Tiel Johano Evangelisto konstruis malgrandan, kvarangulan, brikan konstruaĵon. Maria ĉi tie loĝis mallonge, ĉar ŝia konstanta loĝloko estis urbo Efeso. Oni pensas, ke Maria pasigis siajn lastajn vivtagojn en ĉi tiuj loĝlokoj

Nun ĉi tie funkcias kapeleto, alvenas pastroj kaj ĉiutage oferas sanktan meson. Kelkajn fojojn estis alvenintaj eĉ episkopoj el Romo. Ĉe la dometo ŝprucas fonto. Oni pensas, ke akvo de fonto estas sankta. Ankaŭ apud fonto kaj dometo staras muro, kiu flustras pro leteretoj kun diversaj deziroj de pilgrimoj. En korteto staras monumento de Virgulino Maria.



Dometo de Virgulino Maria



Muro kun leteretoj de pilgrimoj



Fonto eĉ kun tri fluoj



Muro kun leteroj de pilgrimoj



Ruinoj de urbo Efeso

Oni kredas, ke Maria, en fino de sia vivo, jam malsana, loĝis en urbo Efeso. En Najtingala monto ŝi ekloĝis provizore nur por kaŝi sin de romianaj atakoj. Tamen, kiam Maria eksentis pliboniĝon de sia sanstato, ŝi revenis en urbon Efeson.

Neripeteblan impreson elvokis antikva urbo Efeso. Ĉi tiu urbo estis fondita proksimume unu mil jaroj antaŭ Kristo. Oni pensas, ke ĝi estas konstruita de militemaj amazonoj. Urbo tre detruita pro tertremoj, pro diversaj militoj. Nun estas preparita tri km areo de ĉi tiu urbo ĝis fundamentoj por vizitantoj.

Ruinoj de urbo Efeso



Ruinoj de urbo Efeso



Templo de Hadriano



Biblioteko de Celsio (oni pensas, ke ĝi enhavis 12 mil. da pergamentaj rulaĵoj)



Ruinoj de urbo Efeso



Ponto de Trajano



Grandega amfiteatro



Tio ĉi estas strato sub la nomo Curetes



Grandega amfiteatro



Malproksimen iranta pado , ankoraŭ ne malkovrita por turismo

Arkeologia pado direktas preter Biblioteko de Celsio, kies fasado estis rekonstruita el ĉi tie trovitaj rompaĵoj nur en la 1970-1980 jaroj. Ĉi tiu Biblioteko estis konstruita 125 jaroj post Kristo kiel tombo kaj monumento al Tiberio Celsio, kiu estis senatoro de Roma imperio. Biblioteko estis detruita en 262 j. dum tertremo.

Tiu sama grandega amfiteatro, en kiu okazis diversaj kunsidoj, amuzoj kaj eĉ gladiatoraj bataloj. En amfiteatro estis sidlokoj por 25 mil spektantoj. Ĉi tie ĝis hodiaŭ okazas koncertoj.

Efeso estis unu el 12 la plej gravaj urboj en antikva tempo de Grekio. Kiam estis fondita inperio de Romo, Efeso fariĝis unua urbo post Romo. Oni pensas, ke en I-a jarcento antaŭ Kristo, en Efeso loĝis ĉirkaŭ 200 mil da loĝantoj.

En ruinoj de urbo nun oni povas ekvidi restintajn nedifektitajn arkitekturajn detalojn, partojn de urbaj pordegoj, kolonojn, pontojn, lokojn de temploj, pavimojn , diversajn detalojn de ornamaĵoj kaj t.plu.

Informilon preparas redakcia komisiono.

Pro enhavo de artikoloj respondecas mem subskribintoj

El rompaĵoj muntita kolono montras lokon de sanktejo de Artemido. Sanktejo ofte ekbruliĝadis aŭ detruigis dum tertremoj. Finfine ĝi estis rekonstruita laŭ arkitekto Heristrono en la 6 jarcento antaŭ nia ero. Sanktejo funkciis eĉ 200 jarojn. Oni diras, ke ĝi havis 127 marmorajn kolonojn, grandegan skulptaĵon de Artemido kaj freskojn sur la muroj. Sanktejo estis grandega, longeco de sanktejo estis 109 m kaj ĝia larĝeco – 50 m.

En Biblio oni skribas pri tio, kiel apostolo Johano forpelis kolerajn animojn el sanktejo kaj post forpelo tuj detruigis altaro kaj duono de sanktejo. Ĉi tiu sanktejo dronis nur en 1874 j.

Oni supozas, ke apostolo Johano verkis sian Evangelion en urbo Efeso. Ankaŭ tre aktive agis apostolo Paŭlo, kiu tie loĝis kaj verkis siajn leterojn al efesanoj.

Do, Efeso suferis ofte pro tertremoj, pro diversaj militoj kaj urbanoj po iomete forlasis urbon kaj ekloĝis en najbara regiona urbo, kiu nun nomiĝas Selchuk.

Malsupre kelkaj fotoj de ruinoj de antikva urbo Efeso



La insulo SAMOS

Pasintjare kiam mi kun miaj genepoj Bernadeta kaj Liudviko kaj kun pranepo Jacob vizitis dum du semajnoj Turkion, ni decidis viziti ankaŭ insulon SAMOS, kiu apartenas al Grekio. Insulon SAMOS ni atingis per ŝipo. Ŝipo eknavigis el haveno de Kuŝadasi kaj navigis tra Egeja Maro unu kaj duonon de horo ĝis kiam atingis insulon SAMOS.

Informilon preparas redakcia komisiono.



Haveno de Kuşadası (Turkio)



Mi en ŝipo dumvoje al grekia insulo



Jacob kaj mi en ŝipo



Jacob kun lia patrino Bernadeta



Liudviko en ŝipo



Malproksime videblas insulo SAMOS




Urbeto kaj haveno Pythagorio


Ni enloĝiĝis en hotelo Helektra, kiu situas proksimume 3 km de urba centro, sur montdeklivo

Finfine ni alnavigis insulon SAMOS. Vetere estis bona, suneto varmigis super 30 gradoj laŭ Celsio.

Vidu, urbeto ankaŭ haveno Pythagorio situas ĉe montpiedo tute apud Egea Maro. Pro tiu kaŭzo la suno tre envarmigas urbeton, situantan en montdeklivo. Supraĵe tie vetere ĉiam estas varma kaj ĉielo plej ofte estas serena.



Pythgoria, kien montras ruĝaj montriloj malsupre



Ni atendas ŝipon por reveni en Kuŝadasi




Stratetoj tre mallarĝas de urbo Pythagorio



En kafejo



En restoracio Ambrosia



Mi en haveno Pythagoria




Tamen plaĝo estas ŝtonoza kaj malbona. Bone, ke akvo estas tre pura, tamen pli sala ol en Balta maro.


Nutraĵo estas bongusta, porcioj grandaj. Kelneroj viroj estas kompleksaj kaj ĝentilaj. Estas videble, ke homoj en Grekio estas pli riĉaj, ol en Turkio. Mi vidis nur bonajn aŭtomobilojn, homojn bele vestintajn. Urbeto estas orda kaj pura. Ni plej multe nur promenadis tra urbeto, ĉar vetero estis varmega kaj ni ne deziris viziti pli malproksimajn lokojn.

Informilon preparas redakcia komisiono.

Pro enhavo de artikoloj respondecas mem subskribintoj



Ni adiaŭas kun SAMOS



Jam suneto okcidenten... Adiaŭ SAMOS...



Ni ree en Turkio, en haveno Kuŝadasi

Informilon preparas redakcia komisiono.



Ni ree en Turkio, en haveno Kuŝadasi

Informoj



Strato en Kuşadası



Pejzaĝo de Turkio

Zofija Babonienė

La 23-an de aŭgusto Litova televidkanalo TV3 en programero „Novaĵoj“ raportis pri Rimantas Endriulaitis. Raportaĵo estis ligita al Baltia Vojo kaj Litova Reordiga Movado kaj temis pri la insignoj, kiujn produktis Rimantas tiucele. Kvankam pri Esperanto oni ne menciis eĉ unuvorte, tamen inter prezentitaj insignoj estis videblaj multaj Esperanto insignoj, ankaŭ tiuj de E-klubo „Horizonto“. Raportaĵo daŭris kelkajn minutojn kaj estis ripetita kelkfoje en „Novaĵoj“.

Nunjare 100-jariĝis ekde „Sinjoro Tadeo“ de Adam Mickiewicz estis tradukita en Esperanton. Tradukon de la poemo efektivigis A.Grabovski.

Enkadre de la internacia pola – litova junulara aranĝo, dediĉita al A.Mickiewicz - poeto de du popoloj, la 03.09.2018 en Vilnius, en Instituto de litova literaturo kaj folkloro (Antakalnio str.6) okazis prezento de la filmo „Sinjoro Tadeo“ en Esperanto. Filmon de reĝisoro A.Wajda „Sinjoro Tadeo“ prezentis ĵurnalisto, reĝisoro, verkisto, esperantisto Roman Dobrzynski, kunlaborinta verkante esperantlingvajn titolojn al la filmo. Esperantlingve filmo „Sinjoro Tadeo“ unuan fojon estis spektita 2009 en Bjelistoko dum Universala Kongreso de spektantoj el 65 landoj. Verkisto R.Dobrzynski dum la aranĝo en Vilnius prezentis ĵus verkitan libron „Sinjoro Tadeo parolas esperante“. Dum la aranĝo estis parolitaj tri lingvoj: litova, pola, Esperanto. En la aranĝo partoprenis 31 gejunuloj el Pollando, 30 el Litovio kaj esperantistoj de Vilnius, Kaunas kaj kelkaj el Pollando. Tiun aranĝon partoprenis ankaŭ L.Abromas, membro de nia E-klubo „Horizonto“.



Partoprenintoj antaŭ la pordo de Instituto



**En la salono de la kunveno
Fotoj de Antanas Grincevičius**



R.Dobrzynski interparolas kun partoprenantoj



R.Dobrzynski kaj A.Čižikaitė antaŭ partoprenintoj

**Redaktoro: Stanislovas Raulynaitis
Korektadon okazigis L.Abromas
Kontaktoj: klubas.horizontas@gmail.com
Tel. Nr. 8-620 21024**